

INTERLANGUAGE



AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE



AMERIKA ESPERANTISTO

*Oficiala Organo de la
ESPERANTO-ASOCIO
de NORD-AMERIKO*

JULY-OCT, 1955

AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

(*Amerika Esperantisto*)

G. ALAN CONNOR, *Editor*

Vol. 69

114 West 16th Street

New York 11

N. Y.

Nos. 7-10

Co-Editors: Dr. William Solzbacher, Doris Connor, Myron Mychajliw.

Sustaining Board: Portia Anderson, Dr. Luella K. Beecher, Dr. F. W. Breth, John M. Brewer, Allen L. Brown, A. M. Brya, Jarvis E. Bush, C. C. Cummingsmith, S.M., Dr. Lee-Min Han, Horace C. Jenkins, Mrs. S.S. Marks, Bertha E. Mullin, Tony Nabby, George Hirsch, Andrew I. Rogus, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Dr. William Solzbacher, Mazah E. Schulz, Virgil Whanger, Paul E. Nace, Carl Wyatt Childress.

Office Assistants: Lola Mae Muse, H. S. Harris.

NOVAJ LIBROJ DE "STAFETO" – BONA LEGAĴO

EL LA MANIKO

Novelaro de Reto Rossetti. La libro, kiun ĉiu ŝatos. En kuraĝa, noveca, literaturpionira lingvo. Bravuraj studoj, vivaj dialogoj, ironiaj rakontetoj, priesperantaj rakontoj, sana humoro – tia estas la enhavo de la libro. La libro, kiun ĉiu devas havi! 221 paĝoj, 6½" x 9", broŝurita kun dukolora kovrilo.

Prezo \$2.15 afrankite.



KOKO KRIAS JAM!

Originala novelaro de Ferenc Szilagyi. Fnhavas dektri originalajn novelojn en Esperanto de fama verkisto, tradukisto, ĵurnalisto kaj recenzisto. Simpla stilo, interesaj intrigoj. La libro rekomendinda por ĉiuj amatoroj de vere bona legaĵo. 225 paĝoj, 6½" x 9", broŝurita, kun dukolora kovrilbildo.

Prezo \$2.15 afrankite.

(*Members of EANA deduct 10% from above prices.*)

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.

Subscription rate in the United States and Canada: \$3.00 per year.

Make checks payable to the *Esperanto Association of North America*.

Patron Membership in the EANA – \$10.00 per year

Regular Membership in the EANA – \$5.00 per year

Student Membership & Armed Forces – \$3.00 per year

AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 69

JULY-OCTOBER 1955

Nos. 7-10

THE AIMS AND CLAIMS OF ESPERANTO

Half a Century – From Boulogne to Bologna

THE world interlanguage Esperanto has reached the half-century mark in its public history. After 1887, when Dr. L. L. Zamenhof's first textbook was printed, the language passed through a lengthy period of experimentation and internal growth before it presented its aims and claims to the world at large at the First Universal Esperanto Congress, at Boulogne-sur-Mer, France, in August 1905.

This year's Jubilee Congress, held at Bologna, Italy, from July 31 to August 6, took stock of what has been accomplished in the past fifty years and pointed out what remains to be done. When the Honorable Giuseppe Dozza, Mayor of Bologna, made a speech in fluent Esperanto, welcoming approximately 1,700 Congress members from 36 countries, he had at his side, as his guest of honor, Mayor Héguenette of Boulogne-sur-Mer, the city of the first Esperanto Congress. Representatives of fifteen governments (Austria, Belgium, Brazil, Denmark, Finland, France, Germany, Israel, Italy, the Netherlands, New Zealand, Norway, Sweden, Uruguay, and Venezuela) were seated on the platform and greeted the Congress, most of them in eloquent Esperanto. The President of the Council of Europe, which includes most European countries outside the Iron Curtain, had sent a personal representative. Those present included also four "veterans" of the First Esperanto Congress, who had been active in the Esperanto movement from Boulogne to Bologna, among them Dr. Edmond Privat, Professor of English Literature and Civilization at the University of Neuchâtel, Switzerland, and the Swedish journalist, Paul Nylén.

The President of the Italian Republic, Giovanni Gronchi, as well as his two predecessors (ex-Presidents Einaudi and De Nicola) were Members of the Honorary Committee, and President Gronchi sent a cordial telegram of greeting to the opening session. The Honorary Committee also included the Prime Minister, the President of the Senate, the Speaker of the House of Representatives, the Ministers of Education, Transportation, and Tourism, the Governor of the Province of Bologna, the Presidents of the Italian Broadcasting Corporation, the Union of Chambers of Commerce, the Italian Red Cross, etc., and a large number of men prominent in public life, business, science, education, and literature.

The walls of public buildings in Bologna were covered with posters carrying a proclamation of the Mayor in Italian and Esperanto, requesting all citizens to give an enthusiastic welcome to the Esperanto Congress: "May these guests of honor, coming here from all parts of the world, enjoy the cordial hospitality of our city, with the sincere wish that the ideal of brotherhood and harmony among the peoples, symbolized by the five-pointed Green Star, may come steadily closer to its accomplishment through the establishment of a lasting peace and of real friend-

ship among the peoples of the world".

Most of the meetings of the Universal Esperanto Congress were held at the University of Bologna, one of the oldest and most famous centers of higher education in the world. An International Summer University in Esperanto was combined with the Congress. The Rector (President) of the University of Bologna served as Honorary President, and his academic colleague and neighbor, the Honorable Giorgio Canuto, Rector (President) of the University of Parma, delivered the first lecture. He was followed by ten other scholars and educators, from seven different countries.

Discussions at the planning meetings of the Bologna Esperanto Congress were dominated by the need to follow up the success achieved last December at the Eighth Session of the General Conference of UNESCO (the United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization) at Montevideo, Uruguay. A UNESCO resolution adopted at that time recognizes the results achieved by Esperanto and authorizes the Director General to follow further "developments in the use of Esperanto in science, education, and culture, and, for this purpose, to cooperate with the Universal Esperanto Association in matters concerning both organizations". (See "Esperanto Wins Recognition at Montevideo UNESCO Conference" in the January-February 1955 issue of the *American Esperanto Magazine*). A basic work plan for the future was adopted at Bologna.

A decision of both symbolical and practical significance was announced by the Mayors of Bologna and Boulogne. They signed a compact pledging close cooperation between their cities, in which the historic Esperanto Congresses were held in 1905 and 1955, and promising to "facilitate in all fields exchanges between their citizens through Esperanto."

On the North American continent as well, the fiftieth anniversary of the organized Esperanto movement was celebrated this year, when the Esperanto Association of North America, founded in 1905 in Boston, held its Jubilee Congress in Milwaukee.

It was evident at Milwaukee as well as at Bologna that members of the Esperanto movement can be proud of what has been accomplished in half a century of hard work and solid progress. Esperanto is being used constantly and successfully in many fields of action. It is facilitating understanding and cooperation throughout the world. It has built up organizations and institutions which render valuable services every day of the year. It has its press, its literature, its radio programs, its classes, clubs, and associations.

But this is not enough. It may even be argued that members of the Esperanto movement, while building up the institutional strength which assures its continuity and survival, have too often isolated themselves from the outside world and have neglected to get their message across to millions of people who would greatly benefit from learning and using the language. There is great need for making the facts and figures known to all those who are—or should be—interested in the world language problem.

There is sufficient evidence that the question is in the air. Members of the Esperanto movement have the duty to demonstrate convincingly that Esperanto is the answer to the problem and that it makes no sense to wait for another solution.

ESPERANTO IN ACTION AROUND THE WORLD



Publications of the Modern Language Association of America in its Directory issue for the current year (September 1955) again lists both the American Esperanto Magazine (on page 231) and the Esperanto Association of North America (on page 238) in the section entitled "A Directory of Useful Addresses."

The International School of Violin-Making at Cremona, Italy, has published a descriptive booklet in six languages, including Esperanto.

The Brazilian Cocoa-Growers' Federation has included in its budget for the current year a subsidy of 10,000 cruzeiros for the Esperanto Society of Ilheus.

The German Federal Railroad Administration has added a full page of explanations in Esperanto to the current editions of both its Complete Train Guide (*Kursbuch*) and its Book of Condensed Long Distance Schedules (*Fernfahrplan*).

In the Powerful British Cooperative movement Esperanto has been promoted and used on frequent occasions. Recently the British Federation of Young Cooperators, at its 24th Annual Delegate Conference, passed this resolution: "The Conference is of the opinion that, as from the age of eleven, children in all schools of the world should be introduced to the fundamentals of Esperanto, so as to bring about better understanding between nations." Somewhat earlier, the National Congress of the Women's Cooperative Guild, at Bristol, adopted a resolution asking the British government to include Esperanto in the school curriculum. The July 1955 issue of the Cooperative Home Magazine included a one-page article by G. L. Bolton, "Esperanto Is The Answer".

The Austrian Commerce Association published in its Bulletin for Business schools and Business School Graduates an article written by its Executive Director, Alfred Adolf Rotter, pointing out that a more intensive study of languages is essential for young businessmen and commercial employees, and urging business men to be pioneers in the language field by learning and using Esperanto.

Esperanto Streets and streets named after Dr. L. L. Zamenhof, author of Esperanto, are becoming more and more numerous throughout the world. Latest additions to the list: a Zamenhof Street in Bologna, Italy, and Esperanto Streets in Kaiserslautern, Germany and Venado, Argentina.

Copenhagen, Denmark, is the city where the 41st Universal Esperanto Congress is scheduled to be held August 4-11, 1956. It is the first time that an Esperanto World Congress convenes in Denmark.

"Children of the World", the huge Japanese publishing project using Esperanto for the gathering of articles and stories written by children, and publishing regularly a bulletin in Esperanto and English, is making steady progress. The first two volumes of the 15-volume project have appeared, the third is expected to be out in the immediate future.

How Esperanto saved his life is told by a German member of the Esperanto movement in the August 1955 issue of *Germana Esperanto-Revuo*. The man, by the name of Rosner, was serving in the German Army in Italy when he was captured, in February 1945, by a group of Partisans of the Italian Underground. They handled him roughly until one of them, searching Rosner's pockets, found a Hungarian Esperanto "key". The Italian immediately began talking in Esperanto to him, saw to it that he was treated well, and three weeks later managed to have him included in a group of prisoners who were exchanged for captured Partisans.

The New International Year Book (Funk and Wagnalls Company, New York) in its 1955 edition again carries a detailed article on Esperanto (pp. 147-148) summarizing progress and developments in the year 1954. It is the seventh annual article of this kind contributed to the Year Book by Dr. William Solzbacher.

The Esperanto Association of North America is listed again in the 1955 editions of *The World Almanac* (p. 490), the *New International Year Book* (p. 483) and the Funk and Wagnalls *New Standard Encyclopedia Year Book* (p. 414).

After spending more than ten years in Soviet prison camps, a German journalist, Artur Pankratz, author of an Esperanto Textbook and once Editor of an Esperanto journal, has returned to Germany. He reports that in Soviet prison camps he met a large number of inmates who spoke Esperanto, and that these included Germans, Poles, Finns, Estonians, Russians, Ukrainians, Tatars, Georgians, Uzbeks, and Japanese. Repeatedly he was able to teach Esperanto classes in captivity, using Russian, Polish, German, English, and Turkish as the languages of instruction.

Guidebook albums of six Brazilian cities have been published in Esperanto by the Brazil Government Institute of Geography & Statistics.

Esperanto was made a compulsory subject for the students in the "B Stream" of the Temple Secondary Modern School for Boys, in Rochester, England, beginning September 1955.

Business firms and international transportation companies which recently used Esperanto in their advertising include: SAS (Scandinavian Airlines System); Swissair; Swedish State Railroads; German Federal Railroads; the Frederikshavn-Larvik Ferry, Norway; Gevaert photographic materials, Belgium; Philips electric and electronic supplies, Netherlands; Ytong building materials, Sweden; Casavan Carrara Marble, Italy; Simmenthal Canned Meats, Switzerland; Helical Bar and Engineering, Britain; Bultsfabrik A. B., nuts and bolts, Sweden; Banco di Napoli, Italy; Bravo candy, Italy; Trade Fair of Padova, Italy; Aspro, France; Dusausoy Jewelers, France; Model Fair of Melbourne, Australia.

The Esperanto Association of North America

USE THE ESPERANTO FILM OF DENMARK –“DANLANDO” FOR YOUR FALL AND WINTER CLUB PROGRAMS



HIS interesting film of Denmark – from early bronze-age history to modern times – is available from EANA for your class and club programs. Now when fall activities are beginning is the time to utilize it for creating interest in your group. It is a 16 mm black-and-white silent film with text in Esperanto printed at the bottom of the pictures. It runs for approximately 45 minutes, and comes in two large reels.

A small rental of \$2.00 is charged to take care of postage, packing and handling. You may receive the film direct from the Central Office of EANA. Write today and arrange for an interesting club program.

DIVERSAJ ANONCOJ

Novaj membroj de la Subtena Komitato: Estas granda plezuro bonvenigi la sekvantajn kiel membrojn de la Subtena Komitato de EANA dum la Jubilea Jaro: *Paul E. Nace kaj Carl Wyatt Childress.*

Novaj Membro-Patronoj de EANA: Lastatempe renovigis sian membrecon en la alta kategorio de Patrono por la Jubilea Jaro la jenaj personoj: *Eugene M. Beck, J. Leo Chapman, John F. Clewe, James C. Faughnan, Anton Lenhardt, Herbert Smart, D-ro W. Solzbacher.* Dankon!

En la kampanjo “Ĉiu Membro Varbu Unu Novan Membron”, depost Junio la jenaj membroj sukcesis varbi novajn membrojn por EANA (ĉefe dank’ al “Leteroj al Redaktoroj”): *R. Vineski (2), H. Soudée (6), D. Walton (2), R. Palmer (1), J. Balaklaw (1), A. Bartosz (2), J. Bush (2), J. Healy (2), S. Zemojda (1), H. Dillinger (1), L. Fuller (1), Ch. MacDonald (1), A. Nixon (3).* Jen la kvin unuaj, kiuj varbis dum ĉi tiu jaro ĝis nun plej multe da novaj membroj por EANA: *H. Soudée (23), R. Vineski (9), J. Bush (4), L. Fuller (4), P. Heinle (4).*

Abonon de “Amerika Esperantisto” por dek bibliotekoj donacis *S-ino Jewell Bainbridge.* Koran dankon. Kiu la sekvonta?

Ekstraj kontribuoj al la Subtena Kaso estas ricevitaj lastatempe de la sekvantaj: *William P. Vathis (\$1), James F. Rettger (\$2), Wm. J. H. Knappe (\$1), kaj de Meredith Bauman ni ricevis \$25 “En memoro al Esperanta pioniro, S-ino Flora Wyman”.* Sinceran dankon!

An occasional defective copy of AE may pass through our hands without being noticed. It is evident that with some 1500 copies sent out each issue, we cannot examine each copy for internal defects. Even an occasional defective cover may be sent out. Our printer is usually careful, but several defective copies of the May-June issue came to our attention. We could not catch all of them however. Please, if you receive a defective copy at any time, inform us and we will gladly send you another copy. We will appreciate your cooperation in this respect.

ESPERANTO KAJ ĜIAJ VORTAROJ

Donald R. Broadribb

Noto: Ĝi tiu artikolo ne estas nia recenzo, sed interesaj sciigoj de la ĉefa kunlaboranto de IVE pri la nova vortaro kaj pri vortaroj generale, ekde la komenco de nia lingvo. — Red.

SUR la alia paĝo vi vidas paĝon el la nova *Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Ĉar ĝi estas la kulmino de tre interesa vortar-historio, mi deziras skizi tiun historion mallonge ĉi tie.

La unua vortaro de Esperanto estis parto de la unua Esperanto-libro "Internacia Lingvo" (1887) de Zamenhof. Baldaŭ poste aperis aparta vortaro Esp-rusa, kiu estis, kiel la aliaj Esperanto-vortaroj de la 19a jarcento, nur vortlisto, sen difinoj.

En nia jarcento la Esperanto-movado komencis kreski kaj serioziĝi. Jam en 1901 la franco De Beaufront interesigis parizan eldoniston Hachette pri libroserio esperanta. Tiam li kun Zamenhof komencis kribri la ĝis tiam ne reguligitan Esperanto-vortaron por definitiva Esperanto-franca leksikono.

Interesas nin scii, ke nia "Millidge" aperis en 1912, do tre malfrue. De tiam gravaj vortaroj dulingvaj abundas en Esperanto. Precipe menciinda estas la giganta *Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana* de Wüster, nun malnova, sed valorega.

En la 1930-oj teknikistoj komencis serioze interesigi pri Esperanto, kaj teknikaj vortaroj komencis grandskale aperi. En AE de julio 1949 kaj Scienca Revuo de 1954 (p. 42-52) vi povas trovi detalajn studojn pri tiu parto de nia leksikologio.

Nia unua tutesperanta vortaro aperis en 1910. Ĝi estis *Enciklopedia Vortareto Esperanta* de Verax, 249 paĝoj. Samjare aperis *Vortaro de Esperanto* de Kabe, 175 paĝoj. La unuan fojon aperis esperanta leksikono kun nuresperantaj difinoj. Tamen jam en 1909 Boirac inkluzivis esperantajn difinojn en sia Esperanto-franca vortaro.

En 1930 SAT aperigis monumentan verkon, *Plena Vortaro de Esperanto*. En 1934 aperis dua eldono. De tiam PV estas nia ĉefleksikono.

Sed pro iu kialo, la iniciatemo de SAT baldaŭ ĉesis. Tria eldono de PV en 1947 estis nur fotografa represo de la 1934-teksto, eĉ sen mencio de la decidoj de LK (nun Akademio) en 1934 kaj 1935. Pasintjare aperis kvara eldono, denove neŝanĝita fotorepreso, kun 63-paĝa suplemento.

Kiam post la milito evidentiĝis ke SAT tute ne intencas eldoni novan PV, meksika kunlaborinto, Francisco Azorín, grupigis ĉirkaŭ si ses spertajn esperantistojn por plene reverki la vortaron, elĵetante la arkaikan tekston kaj farante novan, adekvatan por nia nun matura movado.

En septembro ĉijare aperis la unua volumo. Dua volumo baldaŭ sekvos. En la unua volumo (A-K) estas 642 freŝe presitaj paĝoj grandformataj (23 x 17 cm). Pli ol 600 ilustraĵoj klarigas la vortojn. Grandaj tabeloj de geologio, gramatiko, zoologio, kc. helpas la uzanton.

Inaŭgurante novan epokon en Esperanto, IVE estas libro bezonata de ĉiu esperantisto. Ĝi estas nun akirebla ĉe EANA, Bindita ekzemplero (kun ora surpreso) kostas nur \$7.00, broŝurita \$6.50. Ne estas rabato por ĉi tiu libro.

PAĜO 535 EL LA NOVA "ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO"

Jen reduktita foto-represo de paĝo kies originala grandeco estas 7" x 9 1/2". La libro estas 1 1/4" dika, A-K, 642 paĝoj, pli ol 600 ilustraĵoj. Bind. \$7.00, broŝ. \$6.50, de EANA. Ne estas rabato.

tano. 2 Ligna kraketilo similanta dupecigitan kaŝtananon. V. Klakilo, Krotalo.

KAŜTAN-HARA. Havanta kaŝtankoloran hararon. Ekz. *Kaŝtanhara fraŭlino*.

KAŜTAN-ITO. Kaŝtankolora mineralo de sulfato ferika.

KAŜTAN-KOLORA. Similanta al koloro de kaŝtano.
KAŜTAN-UJO. 1 Ujo por kaŝtanoj, kun kaŝtanoj.
2 Kaŝtanarbo kun kaŝtanoj.

KAT o.^F (*A. cat, D. kat, katte, F. chat, G. Kater, Katze, H.P. gato, I. gatto, Po.R. kot, Sv. katt, L. cattus, el Gr. katta*). 1



Kato angora.

Speco zoologia de felidaj mambestoj domemaj: *Felido kata*. 2 Ano de tiu speco. 3 Generala nomo vulgara de ĉiu besto felida. Ekz. *Kiam kato promenas la musoj festenas; danci kiel kato ĉirkaŭ potoj; vivi kun iu kiel hundo kun kato*.

KAT-A. 1 Rilata al kato; katsimila; kateca. 2 Grekismo signifanta "sube".

KAT-BLEKI (ntr). Miaŭi, fari miaŭon; krii kate. Ekz. *Dum januaro ofte aŭdiĝas katbleki ĉe la tegmentoj*.

KAT-ETO. 1 Malgranda kato. 2 Ĉiu el la du kontraŭhipotenusaj lateroj de ortangula triangulo.


KAT-FELO. Kruda haŭto de kato.

KAT-INO. Ino kata, katforma, katsimila.


KAT-LEDO. Katfelo industrie preparita por ĝin uzi.

KAT-UMI (ntr). Agi kiel kato, grimpi kuraĝe, flati karece, grumbli kontentece...

KAT-ZUMI (ntr). Aŭdiĝi daŭran, mallaŭtan zumadon. Ekz. *La katoj lernas katzumi, ĉar tia brado ne estas instinkta*.



Katafalko.



KATAFALK o.^F (*A. Catafalque, D. G. R. Sv. Po. Katafalk, H.I.P. catafalco, L. catafalcus, el Gr. kata-kimbe, sub-lignaĵo*). Funebra, plimalpli alta podio sur kiu kuŝas parade ĉerko de mortinto.

KATAFALK-ISTO. Katafalkkonstruisto.

KATAKLISM o.^F (*A. cataclysm, F. cataclysmes, H.P. cataclismo, I. cataclisma, R. kataklism, L.*

cataclysmus, Gr. kataklismos, el kata-klizein, sube inundi). 1 Geologie, evento, kiu radikale ŝanĝas la staton de tereno. 2 Katastrofego, granda aliĝo drasta, abrupta. Ekz. *Antikvaj terkataklismoj produktis la premon kaj varmegon necesajn por estigi la karbon*.

KATAKLISM-A. Kataklismaspekta, kataklismisufera. Ekz. *Li vivas en daŭra, kataklisma stato*.

KATAKLISM-I (x). Ekprodukti aŭ ekusuferi kataklismon. Ekz. *Tiu regiono kataklismos pro forta tertremo*.

KATAKLISMO-LOG IO. Scienca studo pri la geologiaj kataklismoj.

KATAKOMB o.^F

(*A. catacomb, D.G. Katakombe, F. catacambes, H.P.L. catacumba, I. catacombe, R. katakomb, Sv. katakomb, el Gr. kata-kumbe, suba kavoj*). Subtera



Katakomboj romaj.

tombarejo ĉe galerioj naturaj aŭ artefaritaj.

KATALEPSI o.^F (*A. catalepsy, D.Sv. katalepsi, F. catalepsie, G. Katalepsie, H.P. catalepsia, I. catalessia, R. katalepsija, L. catalepsi, Gr. katalesis, el kata-legein, sublasi*). Stato patologia de persono, kiu perdis sentumojn, muskolmoveblon, flekseblecon kaj kutime konscion. V. Epilepsio.

KATALEPSI-A. Rilata al katalepsio. Ekz. *Suferi atakon katalepsian*.

KATALEPSI-I (ntr). Esti katalepsia, suferi katalepsion. Ekz. *Li katalepsias daŭre, li katalepsios ripete*.

KATALEPSI-ULO. Homo suferanta katalepsion.

KATALOG o.^F (*A.F. catalogue, D.G.R.Sv. Katalog, H.I.P. catálogo, L. catalogus, Gr. katalogos, el kata-legein, subdiri*). Libro, kiu enhavas orde kompletan liston pri varoj, ekspoziciaĵoj, servoj, adresoj, kc. Ekz. *La katalogo de la Brita Esperanto Asocio enhavas pli ol 50,000 nomojn; katalogo de muzeo*.

KATALOG-EBLA. Povanta aŭ devanta esti katalogata.

KATALOG-I (tr). 1 Fari katalogon: prepari katalogon. 2 Skribi la nomon de io, de iu en katalogo.

KATALOG-IĜI (ntr). Iĝi katalogo; registriĝi kataloge. Ekz. *Ĉu mia libro jam katalogiĝis?*

KATALOG-ISTO. Profesia kataloganto.

KATAPLASM o.^F (*A. cataplasma, D. kataplasme, F. cataplasme, G.Gr.R. Kataplasma, H.I.P.L. ca-*

AMASA EKSIĜO DE ESTRARANOJ KAJ OFICISTOJ DE UEA

"Ĝi sendube havas gravan internan kaŭzon..."

(El *Heroldo*, 25 Aŭgusto 1955, ni represas artikolon pri la konflikto nuntempe en UEA – pri faktoj de amasa ekxiĝo, translogiĝo, pelado al statutŝanĝo, neinformiteco, sekreteco, ktp. Pro tiuj faktoj de malharmonio kaj malfido, la titolo en *Heroldo*, nome "Antaŭen en harmonio kaj kun fido!", ne povas esti alia ol ironia. Ĉar ni deziras pritrakti nur la faktojn en la artikolo, ni presas nur la esencan kernon de la lasta komenta paragrafo, kiu temas sole pri "espero en la estonteco.")

"Post la U.K. de Bolonjo, tri faktoj donas specialan motivon por pripensado:

"Unue, la amasa ekxiĝo de estraranoj kaj precipe ankaŭ de oficistoj de UEA en la lasta tempo, eĉ tiagrade, ke la Centra Oficejo de UEA ne plu estas funkcikapabla en la propra domo en Heronsgate kaj devas translogiĝi al Nederlando.

"Due, la urĝo, per kiu la Estraro de UEA lastatempe pelis la statutŝanĝan aferon tra la findecido, kaj la absoluta neinformiteco pri la dato de la okazonta voĉdonado ĉe granda parto de la membraro.

"Trie, la preskaŭ unuanima apogo, kiun la Komitato donas al la laboroj kaj planoj de la nuna Estraro.

"La unua fakto, treege bedaŭrinda, estas la plej okulfrapa. Tiu amasa ekxiĝo puŝis nian Universalan Asocion, almenaŭ provizore, en grandan kaĉon. Ĝi sendube havas gravan internan kaŭzon, kiun esplori estas tamen ne nia afero. Ke la homoj respondecas, se ili ne jam faris, profunde pripensu tiun kaŭzon kaj klopodu laŭeble eviti ion similan estonte. Cetero cirkulas inter la esperantistaro la plej strangaj onidiroj, ĉu veraj, ĉu malveraj, pri personaĵaj traktadoj aŭ mistraktadoj, pri intrigoj tiaj kaj tiaj, pri diversaj testamentoj kun parte nekutimaj destinoj aŭ postuloj, pri kaŝita ortrezoro, sekreta konto, ktp. Ni ne volas enmiksi nin en ĉion ĉi; ni nur petas la respondeculojn konsideri, ĉu ne pli granda publikeco estonte povos esti dezirinda. Povas esti, ke pro gravaj kialoj necesas teni iujn aferojn sekrete por la granda publiko; sed ĝenerale klareco kaj malkaŝeco estas preferindaj al neklareco kaj sekreteco.

"Ankaŭ la dua fakto, laŭ nia opinio, estas bedaŭrinda, des pli ĉar la definitiva akcepto de la novaj statutoj, malgraŭ la opozicio de malplimulto, ja estis certa. Do la Estraro estus facile povinta eviti eĉ la ŝajnon de pli malpli anticipe interkonsentita arango aŭ tiun de timo pro eventuala fiasko. Kaj estonte nepre ĉiu almenaŭ individua membro estu ĝustatempe informita pri ĉiu eventuale okazonta grava voĉdonado – antaŭ, ne post ĝi, – eĉ se li persone ne partoprenas en ĝi. Kaj se la novaj statutoj tion eble ne permesos, nu, oni ne hezitu refoje ŝanĝi ilin, ĉar ni, la miloj de ĝiaj membroj, estas la bazo kaj la spino de UEA, kaj la gvidantoj, Komitato kaj Estraro, estas niaj elektitoj kaj agas en nia nomo.

"La tria fakto,... Ĝi donas esperon por tre harmonia kunlaborado inter la gvidantaro de nia Asocio en la estonteco..."

Kiel viaj reprezentantoj ĉe Universalaj Kongresoj en Eŭropo, kaj studantoj de ĉiuj dokumentoj ricevataj pri la konflikto en UEA, ni komentas jene en la spirito de klareco kaj malkaŝeco:

(1) Vere, la "amasa ekŝiĝo de estraranoj kaj oficistoj de UEA" – ankaŭ komitatanoj kaj individuaj membroj, kiujn *Heroldo* ne menciis – ja "havas gravan internan kaŭzon". *Heroldo* prave diris, ke "malkaŝeco estas preferinda al sekreto", sed ĝi nur listigis kelkajn simptomojn de la kaŭzo, kaj lasas al la "homoj respondecaj" por "profunde pripensu tiun kaŭzon". Tiuj respondecaj, – kiuj alportas absolutisman tendencan al nia movado, – neniam malkaŝos siajn intrigojn. Restas por tiuj de demokrata tendenco, kiuj dum multaj jaroj honorinde estris nian movadon, antaŭ siaj ekŝiĝoj, por malkaŝi la "gravan internan kaŭzon". Sed preskaŭ ĉiuj ne kuraĝas fronti la veron, kiu estas unuvorte "absolutismo". Metafore, la urso ne plu havas nur sian piedon en nia tendo, sed nun enŝovas sian kapon. Povos esti, ke se ni ne eblos forteni la ursojn, ni devos starigi novan kontraŭ-ursan tendaron.

(2) Vere, ankaŭ, "pelado" kaj "neinformiteco" ĝuste priskribas pri la statutsanga afero en UEA. Se ni sekvas la konsilon pri "klareco kaj malkaŝeco", ni devas diri, ke la statutsango estis nur por fiksi la ĉefon de la absolutistoj en postenon de potenco kaj kompenso. Krom tiu elstara fakto, ne estas signifaj ŝanĝoj en la Statuto. Tamen, granda diferenco tuj montriĝas pri la aplikado de la Statuto. Landaj Asocioj, en liberaj landoj, devus pripensi kaj konsideri la fakton, ke la nuna UEA rapide glitas al ignoro pri la rajtoj de landaj asocioj, kaj revenas al la stato de UEA antaŭ la Kontrakto de Kolonjo, – sed kun nova monolita principo de *maldekstra universalismo*. Ekzemple, Par. 13 de la Statuto, kiu diras, "UEA akceptas el unu regno nur unu landan asocion", UEA nun tute ignoras. Atentinda fakto estas, ke UEA akceptis la maldekstran organizon ELNA kiel duan landan asocion en Usono, spite de la Statuto, kaj sen oficiala pritraktado kun EANA, kaj eĉ sen raporto de la oficiala komisiono elektita pasintjare, – ĉar tiu komisiono ĉesis funkcii jam antaŭ la Bolonja kongreso pro ekŝiĝoj el UEA. Tamen absolutismo ne hezitas rompi la Statuton, kiam tiu ago plifirmigas la potencon per plia apogo de la maldekstra flanko de nia movado. Ne plu "unu landa asocio en unu regno", spite de io ajn skribita en la Statuto. Jam delonge la nuna potenculo en UEA sukcesigis la akcepton de kvar landaj asocioj el Jugoslavio, kaj en Bolonjo sukcesigis la akcepton de unu pli, entute kvin: Bosnio, Jugoslavio, Kroatio, Serbio, kaj Slovenio. Kaŭzo? Matematike, kvin landaj asocioj plus du pliaj komitatanoj C estas *sep* voĉoj el la absolutisma regno de Tito. Nur landaj asocioj, kiuj voĉdonas per la maldekstra mano estas bonvenaj nun en UEA. Do, ELNA akceptiĝis kune kun Pollando kaj Bosnio (distrikto en Jugoslavio), dum la kongreso en Bolonjo.

(3) Pri la tria fakto, *Heroldo* notis, ke la Komitato en Bolonjo donis "preskaŭ unuaniman apogon" al la nova Estraro de UEA. Sed ne menciitaj estis la ekŝiĝoj kaj neĉeestoj de diversaj Komitatanoj de UEA. Ĉiu inteligenta persono jam alklutimiĝis al "preskaŭ unuanima apogo" en aferoj sub "absolutismo". Sub tiuj kondiĉoj, kontraŭuloj estas "likvidataj". Nur notu la fakton de "amasa ekŝiĝo" supre, kiu estas alia nomo por "likvidiĝo". Laŭ la faktoj kiujn *Heroldo* mem kuraĝis presi, eĉ sen tiuj klarigoj kaj malkaŝaĵoj kiujn ni aldonas, ni tute ne vidas "esperon por tre harmonia kunlaborado en la estonteco". Kaj speciale por Usono, kie UEA intrigas por anstataŭi nian landan asocion EANA per kontraŭ-statuta akcepto de ELNA – celante "unuaniman apogon" en la Komitato por "la laboroj kaj planoj de la nuna Estraro de UEA". – *La Redaktoro*

ESPERANTA KRONIKO

En la Universitato Harvard, je la fino de la printempa semestro, *S-ro R. Alberg* gvidis deklecionan rapidkurson de Esperanto. Regule ĉeestis la lecionojn 20 personoj.

Pastro Robert Sparks sciigis nin, ke pro stipendio Fullbright kaj instruista interŝanĝa arango, li nun deĵoras en la kolegio Openshaw en Manchester, Anglujo. Li skribis, ke li multe ĝuas la oportunojn ĉeesti la semajnajn konversacikunvenojn de la loka Esperanta societo.

En Claremont, N. H., *S-ro Allan Hutcheon* parolis pri Esperanto antaŭ la loka Rotaria Klubo kaj ankaŭ antaŭ la klubo "Kupples" en loka preĝejo. Pli ol 40 personoj ĉeestis tiun lastan.

La Esperanto-Klubo de la Mezlernejo Naperville, Ilinojo, havas ĉijare 17 membrojn. *S-ro Roy E. Holland* instruas Esperanton al la grupanoj. Samtempe en la YMCA, Naperville, *Ge-sroj Holland* gvidas Esperantan kurson, kiu daŭros 26 semajnojn. La grupo organiziĝis post raportoj en la lokaj ĵurnaloj pri la Eŭropa vojaĝo, kiun faris *Ge-sroj Holland* pere de Esperanto.

La Esperanto-Societo de Ĉikago malfermis sian aŭtunan sezonon per kunveno la 23-an de Septembro, dum kiu *Ge-sroj Roy E. Holland* donis raporton kun fotoj pri sia somera vojaĝo en Eŭropo.

En Detroit, Miĉigano, dum la somero nia juna samideano *Bernard W. Haag* sukcese starigis novan studrondon de 15 personoj, kiuj regule kaj entuziasme studas Esperanton sub lia gvido. Prezidanto de la nova studgrupo estas japana studento *S-ro Koji Akizawa*.

La Esperanto-Societo de Milwaukee donacis bonan stokon da Esperantaj libroj al la Publika Biblioteko de Milwaukee. Dum la Ora Jubilea Kongreso la Centra Biblioteko provizis lokon por bela ekspozicio de Esperantaĵoj.

Saluto de la Bristola Esperanta Asocio (Anglujo), EANA ricevis pere de *F-ino Sybil Lock*, kiu kiel interŝanĝinstruistino el Anglujo nun instruas en lernejo en Sud-Karolino.

Pro reklamo en Esperanto en loka ĵurnalo, farita de *Rufus Teague*

Sud-Karolinano, rezultis interesa artikolo pri li kaj Esperanto, en la ĵurnalo "Charleston Evening Post". Ĵurnalisto *Basil W. Hall* vidinte la reklamon kontaktis *S-ron Teague* kaj poste skribis la artikolon. Jen do propono de *S-ro Teague*: "Mi deziras atentigi aliajn membrojn de EANA pri la ebla efiko de ordinara reklamo en Esperanto en loka ĵurnalo (je kosto proksimume de \$2.00). La fakto, ke la reklamo estas en Esperanto kaj ne en la angla lingvo interesigis almenaŭ unu raportiston kaj el tio rezultis artikolo pri Esperanto. Mi estas certa, ke simila afero povos okazi en aliaj urboj."

Dum lunĉoro ĉe laboro S-ro Teague studas Esperanton.



Juna vizitantino el Nov-Zelando estas F-ino Daphne Roberts, 17-jara, kiu ricevis stipendion por studi unu jaron en St. Paul, Minesoto. F-ino Roberts komencis studi Esperanton antaŭ sia forvojaĝo de Nov-Zelando. Feliĉe estas, ke nun atendas ŝin en St. Paul junaj Esperantistaj studentoj de la kurso de *F-ino Josephine Downey*.



F-ino Daphne Roberts

La unua kolortelevida programo pri Esperanto dissendiĝis de Milwaukee, Wis., okaze de la Ora Jubilea Kongreso de EANA. La bone konata, populara programestro, *Bob Heiss*, de Stacio WTMJ-TV, intervjuis *D-ron Hideo Shinoda* el Japanujo, kaj la *gesinjorojn G. Alan Connor* pri diversaj aspektoj de la Esperanta movado.


Milton R. Davis, kiu organizis antaŭ kelkaj jaroj lecionojn pri temoj el la Biblio sub la nomo "Voĉo de Profeteco" raportis, ke li daŭre presas kaj dissendas tra la mondo la lecionojn ankaŭ en Esperanto. La lecionoj estas laŭ la instruoj de la religia grupo Adventistoj.

En la tuttaga radio-programo "Monitor", dissendita tra tuta Usono la 23-an de Julio, Esperanto estis daŭre menciata de la 10-a matene ĝis la 6-a vespere. Oni komencis per intervjuo pri Esperanto kun *S-ino Doris Connor*. Poste, ĉiun duon-horon S-ino Connor donis unu el la 16 reguloj de Esperanto aŭ anoncis Esperante iun popularan kanton. Je la fino de la programo oni donis nomon kaj adreson de EANA por plena informo pri Esperanto. Post tiu programo Centra Oficejo ricevis pli ol cent informpetojn pri Esperanto kaj pri EANA.

Ni bedaŭras raport pri la morto de du pioniroj de EANA, En Utica, N. Y., la 12-an de Junio mortis *Ernest R. Terrill* je la aĝo de 80 jaroj. (Vidu AE Majo-Junio por plena priskribo pri lia Esperantista vivo.) En Defiance, Ohio, la 6-an de Septembro mortis *S-ino Mabel R. Vicary* je aĝo iom pli ol 70 jaroj. Ŝi unue interesigis pri Esperanto en 1936, kaj servis kiel komitatano en la Loka Kongresa Komitato de Detroit. En 1939 ŝi instruis kurson por altlernejoj laŭ la Cseh-metodo. Ŝi ofte kaj multtrilate helpis pri la propagando de Esperanto en sia regiono.

Artikoloj kaj Leteroj al la Redaktoro lastatempe aperis en la jenaj ĵurnaloj pro iniciato de koncernaj membroj de EANA: "Radiomonde", Verdun, Kanado (*Leo-Paul Trottier*); "El Nacional", Caracas, Venezuelo (*D-ro B. Losada*); "The New Leader", New York (*Mark Starr*); "The Charlottetown Patriot", Kanado (*Chas. R. MacDonald*); "Sunshine Magazine" (*Lillian E. Fuller*); "Kurier Polski", Milwaukee (*A. Bartosz*); "Gwiązda Polarna", Stevens Point, Wis. (*S. Zemojda, A. Bartosz, A. Rogus*); "Sunday Herald", Newfoundland (*C. R. MacDonald*); "Press Gazette", Green Bay, Wis. (*J. E. Bush*); "Catholic Action", Kanado (*Harold Mason*); "Sioux City Journal", Iowa (*R. T. Vineski*); Charles River, Mass. (*Preston Davis, Jr.*); Savannah, Ga. (*F. K. Immeke*). Sciigu nin ĉiam kiam artikoloj aperas, aŭ eĉ kiam vi sendas leteron al redaktoro.

Universal Declaration of Human Rights, in Esperanto, 8 page booklet, 5"x 7½", is available from EANA: 10¢ each, 30¢ for five.



IMPRESOJ PRI BOLONJO

D-ro F. W. Breth

MI deziras skribi pri kelkaj miaj impresoj ĉe Bolonjo. La antikva urbo situas ĉe la piedoj de Apeninoj, kaj pro tio mi timis, ke ĝi estos tre varma. Sed mi spertis agrablan surprizon. Kiam mi forlasis Nov-Jorkon la urbo ŝvitis pro 96^o F. kaj en sekvonta tago mi estis en Bolonjo kie la temperaturo estis 80^o F.

La urbo prepariĝis por inde bonvenigi la kongresanojn. Oni dekoraciis ĉiun aŭtobuson per verdstela standardo kaj sur la muroj estis grandaj afiŝoj (itale kaj Esperante), en kiuj la urbestro petas la Bolonjanojn, ke ĉiu penu fari por la kongresanoj la restadon plej agrabla. Nova strato estis nomita per la nomo "Zamenhof". Urbestro invitis la kongresanojn al regalo en la reĝa kastelo (kiu nun estas urbestra oficejo), kie ni ricevis trinkaĵojn kaj kukojn. Ni ĉiuj ricevis rajtigilon por senpaga veturado per urbaj aŭtobusoj.

Mil sepcent delegitoj de 34 landoj ĉeestis la kongreson. Mi renkontis kelkajn konatojn de pasintaj kongresoj, sed nur unu Usonaninon, s-inon Elise Lippmann el Bruklino. (Poste mi sciigis, ke partoprenis la kongreson entute ok personoj el Usono).

La universitato de Bolonjo estis la kongresejo, sed la inaŭguro kaj pli gravaj kunsidoj okazis en la urba teatro aŭ en Rossini-Konservatorio. (Rossini mem estis Bolonjano kaj ĉi tie verkis la faman operon "Barbiero de Sevilo".) La universitato estas la plej malnova universitato en la mondo, fondita en la dekunua jarcento. En mezepoko, Bolonjo ekzistis nur pro la universitato. Ĝi havis 40,000 loĝantojn, el kiuj 10,000 estis studentoj kaj profesoroj. Multaj famaj homoj studis aŭ instruis ĉi tie; ekzemple Dante, Kopernik, Galvani, Marconi, kaj aliaj. Iliaj statuoj kaj multaj aliaj dekoracias la koridorojn.

La urba teatro, kie okazis la malfermo estas ankaŭ malnova. Ĝi estas konstruita en 1756, sed ankoraŭ estas en perfekta stato. Anstataŭ galerioj ĝi havas kvin aŭ ses seriojn da loĝioj, ĉiu arte orumita. Dum la lumigo la teatro prezentas belegan bildon. La paĝioj estas vestitaj per kostumoj de la deksepa jarcento. En tiu teatro okazis la prezento de la komedio "Revizoro" de Gogol, tradukita de Zamenhof. La teatraĵo daŭris tri horojn.

La vivo en Italujo estas proporcie pli malmultekosta ol la vivo en

Usono. Unu dolaro valoras 622 lirojn. Por bona manĝaĵo kun vino oni pagas nur unu dolaron. La italoj estas tre bonanimaj. Se vi sur la strato demandas ion, kaj se demandito ne scias pri tio, li ne diras simple "mi ne scias ĝin", sed li haltigas la pasantojn kaj demandas ilin ĝis troviĝos iu, kiu kapablas doni informon pri demandata afero. Foje mi demandis policiston kie estas taksi-stacio. Li akompanis min tra kvar stratoj ĝis la loko.

Estas granda ĝojo partopreni kongreson. Oni renkontas multe da personoj, kiuj venas de la tuta mondo. Ĉiu estas via amiko kaj ĝuas babiladon kun vi. Sur la strato renkontanta Esperantisto ĝoje salutas vin per afabla "bonan tagon". Ofte oni deziras lerni de kie vi venas. Kaj lerninte tion, oni kun sopiro kaj revemo esprimas la deziron kaj esperon viziti iam la fabelan landon Ameriko.

Ni plej sincere dankas al la jenaj membroj, kiuj donacis por nia prezentado ĉe la Universala Kongreso en Bolonjo. Post informo, ke ni ne eblis ĉeesti la Universalan, ĉiuj transdonis siajn donacojn, kiuj sumiĝis je \$317.68, por helpi al la Subtena Kaso de EANA. Ĉiu meritas plej grandan dankon de la Asocio:

Horace Jenkins (*estro de la kampanjo*), M. C. Baade, D-ro L. K. Beecher, M. Whipple Bishop, S-ino M. J. Brady, D-ro F. W. Breth, Vern Bruder, J. J. Butler, J. Leo Chapman, Andrew Chmielewicz, S-ino Leslie Davis, Preston Davis, Jr., Harold Dinger, Josephine Downey, Esperanto-Asocio de Nov-Jersio, Elwood R. Etter, Lillian E. Fuller, D-ro & S-ino Joseph Gamba, S-ino J. R. Guthery, J. H. Hartley, Austin Herschel, Rebecca Hill, George Hirsch, J. W. Hughmanic, J. J. Hutchens, Allan Hutcheon, Edith Kane, D-ro Margaret Kidder, Edward Jackman, Donald Jones, Wm. J. H. Knappe, J. Henry Kruse, Julia May Leach, Anton Lenhardt, Lima Esperanto Club, Marie Maffey, D-ro George A. Maggio, W. J. Maier, Harold Mason, Rev. E. L. Mattox, Weldon T. Myers, S-ino N. H. Nelson, S-ino Anker Nielson, Clara Olsberg, Andrew G. O'Reilly, J. Louise Owens, Manuel Certad Paredes, Pastro G. N. Pausback, Orlie Pell, Robert Powell, C. D. Prewitt, Rainbow Lending Library, Grace Randolph, Russell R. Rausch, Ivy K. Reed, James F. Rettger, John M. Robinson, Andrew I. Rogus, Leo Saari, John Salles, J. H. Schackmann, Mazah Schulz, Charles E. Shaw, James V. Sorrell, Henri Sou-dée, Rev. Robert Sparks, Elfrieda D. Stewart, A. H. Stevens, Jr., Francis H. Sumner, Herman Tobusch, Léo-Paul Tröttier, May D. Van Sloun, Frank W. Vedder, Donald Walton, E. L. Wells, Jr., Virgil Whanger, Marjorie Williams, F. Lee York, Elsie Yunghans.

— Doris kaj Alan Connor

ESPERANTO EN MONTREALO

En Montrealo, Kebeko, okazis du interesaj intervjuoj pri Esperanto kun partopreno de la loka Esperanto-Grupo. La Internacia Servo de la Kanada Radio-Korporacio dissendis tra la mondo la 13-an de Septembro intervjuon kaj simpatian priskribon pri Esperanto. La 15-an de Septembro la Televida Stacio CBFT prezentis intervjuon de la grupo en la franca kaj angla lingvoj. Rezulte el tio organiziĝis tri novaj kursoj de Esperanto en Montrealo.

Charles Roy MacDonald en Montrealo raportis, ke li private instruas Esperanton al du individuoj — unu plenkreskulo, alia 12-jara knabineto. Ambaŭ bone progresas kaj la etulino jam deklamas Esperante kelkajn fablojn de La Fontaine.

LA KORVO

"THE RAVEN" de Edgar Allan Poe

Tradukis JON WILLARSON

Foje malgajnoktomeze, dum la kapo pendis peze,
Kaj mi legis volumegojn strangajn, plenajn de folklor',
Dum mi lacis, dolorkapa, ekaŭdiĝis sono frapa,
Kvazaŭ io frapet-frapa, frapis en la koridor'.
"Estas iu vizitanta ulo en la koridor',"
Diris mi kun eta plor'.

Ha, memoras mi kun vero, estis dum la neĝa tero,
Ĉiu disa flamegero brulis kiel ruĝa or'.
Longa nokto tedeginta – vane estis mi peninta
Konsoliĝi legadinta – pro la pensoj pri Lenor',
Pro la belulino kiun nomis anĝelar' Lenor' –
Forvelkinta kiel flor'.

Kaj la silka susureto venadante de l' tapeto
Min timigis per teruroj el la fundo de dolor'.
Tial mi kun kor' batanta staris daŭre ripetanta,
"Estas iu vizitanta ulo en la koridor' –
Iu ulo tre malfrua frapas en la koridor' –
Tio nur, la timon for!"

Miaj pensoj tiam iĝis pli sentimaj kaj mi diris,
"Ja pardonu min mi petas Sinjorino aŭ Sinjor',
Sed en fakto mi dormetis, tiel milde vi frapetis,
Mi apenaŭ vin aŭdetis esti en la koridor'."
Kaj la pordon mi malfermis larĝe al la koridor' –
Jen mallumo, ĉio for.

En nigraĵon scivolante staris mi rigardegante,
Dube, pense, kaj revante aĵojn fremdajn al memor';
Sed silento preme estis, kaj malbruo daŭre restis,
Kvazaŭ kvietaĵoj festis per flustrita vort' "Lenor'!"
Tion flustris mi kaj eĥo remurmuris ĝin, "Lenor',"
En la fundo de la kor'.

Retiriĝis mi kun timo, jen ekbrulis la animo,
Ĉar denove frap' aŭdiĝis tute super la ignor'.
"Certe", diris mi kun krio, "estas ĉe l' fenestro io,
Do sciĝu mi pri tio per rezono kaj esplor' –
Mia koro trankviliĝu dum pensado kaj esplor' –
Estas vent' en stranga hor'."

La riglilon mi eltiris ĉe l' fenestro kaj eniris
Flirte kun majesto Korvo el epoko de l' honor'.
Ĝi ne havis salutguston, senhezite montris bruston,
Eksidiĝis sur la buston kiu estas el marmor' –
Sur la superpordan buston kiu estas el marmor' –
Kaj sidadis kun rigor'.

Tiu birdo de ebono vekis en mi per la kono
De miĉeno tre solena ŝercemecon de l' humor' –
"Kvankam estas via kresto forrazita, via gesto
Kaj la serioza resto estas el la land' de glor'.
Kiel vi nomiĝas Korvo, en la land' de nigra glor'?"
Diris Korvo, "Ĉiam for".

Tion mi ja multe miris, klare vortojn ĝi eldiris,
Sed el gorĝo ili iris ja sen senco aŭ valor';
Ĉar ni ĉiuj devas ridi kiam oni povas vidi
Birdon, kiu daŭras sidi sur la busto el marmor' –
Birdon, kiu sidas sur skulptita busto el marmor' –
Kaj nomiĝas "Ĉiam for".

Sed sur busto ja sentime diris Korvo elanime
Tiujn nurajn vortojn kvazaŭ ili venis el la kor'.
Ne plu vortojn ĝi eltrovis, nek la plumojn ĝi ekmovis.
Diri mi apenaŭ povis, "Ĝi ne restos dum la hor' –
Ĝi forflugos kiel la amikoj en antaŭa hor'."
Diris Korvo, "Ĉiam for".

Mirigite de surpriza respondeto tre preciza,
Diris mi, "Sendube tio estas sola la trezor',
Kiun kaptis ĝi de iu deziranta ke ĝi sciu
Pri la tragedio kiu lin turmentis per angor',
Ĝis la kantoj liaj vibris per la ŝarĝo de l' angor'
De 'Ĉiam-ĉiam for'."

L'animo mia ridetadis ĉar la Korvo nur sidadis;
Ŝovis mi do seĝon antaŭ pordon al la koridor'.
Sur veluron sidigante mi ekpensis scivolante
Kion volas diradante birdo nigra en kolor' –
Kial daŭre diras tiu birdo nigra en kolor'
Tiujn vortojn "Ĉiam for"?

Mi konjektis tion provis, tuj rigardoj miaj trovis
Ke okuloj ĝiaj ege brulis en min kun dolor'.
Mi pensadis kun diveno, kaj kun kapo en la teno,
Sur velura la kuseno aspektanta kvazaŭ or' –
Sed veluran la kusenon aspektantan kvazaŭ or'
Ŝi ne premos – ĉiam for!

Tiam pensis mi, ke vere la aero pezis pere
De fantoma incensfumo kunmiksita kun vapor'.
"Aĉegulo," kriis mi, "do estas vi nur diablido
Turmentanta min per vido de la anto al Lenor'!
Ĉesu – ĉesu kaj forgesu pri la morto de Lenor'!"
Diris Korvo, "Ĉiam for".

"Profetaĉo!" mi ekkriis, "Ĉu ja ĉion vi eksciis?
Ja vin sendis al mi Dio el la land' de nigra glor',
En la mondon de malpleno kie ĉiu entrepreno
Ne valoras je la peno – diru, pro la mia plor' –
Ĉu Ĉielo estas gaja? – diru al la mia plor'!"
Diris Korvo, "Ĉiam for".

"Profetaĉo!" mi rektiis, "Ĉu ja ĉion vi eksciis?
 Pro Ĉielo plej potenca kaj la Dio de l' ador',
 Diru al mi veron tiun: Ĉu mi trovos tie iun
 Belulinon dolĉan kiun nomis anĝelar' Lenor' –
 Trovos tiun belan kiun nomis anĝelar' Lenor'?"
 Diris Korvo, "Ĉiam for".

"Tiuj vortoj estu via adiaŭo!" kriis mia
 Gorgo, "Amikecon nian jam elviŝu el memor'!
 La mensogon Di' malbenu, en soleco min Li tenu,
 Aĉan korpon vian prenu de la busto el marmor'!
 Tuj figuro nigra estu forigita de l' marmor'!"
 Diris Korvo, "Ĉiam for".

Nun la Korvo silentadas, kaj sidadas, kaj sidadas,
 Sur la pala superporda busto je la koridor',
 Kaj okuloj de malbono min penetras de l' demono,
 Ĝia ombro sur la fono estas nigra en kolor' –
 Kaj animo mia el la ombro nigra en kolor'
 Ne levigos – ĉiam for!



FIRST THOUGHTS OF CHRISTMAS USE ESPERANTO GREETING CARDS

If you want your Christmas greeting to be different, use Esperanto greeting cards this year. Here are two offers especially suited to your needs. Both selections are of highest quality and truly artistic.

No. 1 Beautiful, super-quality Esperanto Christmas cards.
 The outside cover design: A large Esperanto Green Star, cleverly made up as Santa Claus, printed on a background of white de luxe "Fiesta" paper with art deckle edge dyed a beautiful green. The message in Esperanto inside: Appropriate and in good taste, surmounted by a small green star, ends with the old familiar greeting *Ĝoĵan Kristnaskon – Feliĉan Novjaron*. The matching envelopes have the same green deckle edges on the back flap. Size 4 3/4 x 6 3/4 inches. Postpaid. Net prices include envelopes:
 12 for \$2.35; 24 for only \$3.50 (less than 15¢ each); sample for 25¢

No. 2 Assortment of 10 Christmas postcards, each with a different Esperanto design, printed in three and four colors. All with bright, cheerful illustrations and the Esperanto greeting: *Bondeziras por Kristfestoj kaj Novjaro*. In sets of ten.
 10 cards for 60¢; 50 for only \$2.50; sample for 10¢ – all postpaid

Order your Christmas supply NOW from:

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.



DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. responduĉupo); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Brazilo:** Macário da Silveira, Escola Preparatória de Cadetes do Ar, *Barbacena* (M. G.) Dez. kor., interŝ. PK, PM kun la tuta mondo.
- Brazilo:** João Mueller, Seminario Central São Leopoldo, *Rio Grande do Sul*. Katolika seminariano dez. kor. kun usona katolika seminariano, Esperante aŭ angle.
- Brazilo:** Ruth Quintão, Rua Floriano Peixoto 128, *Barbacena* (M. G.) Fraŭlino dez. kor., interŝ. PK, PM kun la tuta mondo.
- Ĉeĥoslovakujo:** Karel Schmuck, Ocelarska č. 41, *Ostrava VII*. 35-jara fraŭlo deziras korespondi.
- Francujo:** Daniel Luez, Boulevard Brossolette, *Laon* (Aisne). Juna instruisto dez. kor. kun junulino en Usono. Nepre respondos.
- Germanujo:** W. Golosow, Postlagernd, *Ingolstadt* (Donau). Dez. kor.
- Germanujo:** F-ino Johanna Schwartz, Sankt Paul 32, *Erding*. 33-jara sekretario, blonda brunokulino, mezgranda dez. kor. kun Usonanoj. Volonte enmigros Usonon.
- Hispanujo:** Emilio Miralles, Felix Pizcueta 6, *Valencia*. 40-jara inĝeniero dez. kor. kun simila profesiulo.
- Japanujo:** Kiichiro Kasamatsu, c/o Toku Date, 106 Nishi 1 cho-me, Kitabake, Abeno-ku, *Osaka*. Dez. kor., interŝ. PK, PM, alumet-etikedojn.
- Nederlando:** H. Oosthoek, Bree 49-a, *Rotterdam* (Zuid). 58-jara, dez. kor. kun Usonanoj pri politiko, ekonomio, ktp.
- Turkujo:** Ahmed Hezarfen, Hamidiye Köyü Okulu Basöğret, *Keciborlu*, Isparta. Instruisto dez. kor., filatelisto.
- Urugvajo:** Alberto Máthon Viña, Hector Miranda 383, *Canelones*. 20-jara studento dez. kor. kaj interŝ. PK, PM.
- Usono:** Edward F. Lacy III, P. O. Box 805, *Houston 1*, Texas. Usona Baha'i-ano dez. kor. kun aliaj Baha'i-anoj (-inoj) en Usono kaj en la tuta mondo, speciale kun tiuj en Irano kaj Izraelo. Ankaŭ dez. aĉeti Baha'i-ajn librojn, libretojn, broŝurojn, kaj similajn en Esperanto, araba kaj persa lingvoj.
- Usono:** D-ro S. B. Kahan, 1717 Bryant Ave., *New York 60*, N. Y. Dez. kontaktiĝi kun Esperantistoj en Nov-Jorko kaj ĉirkaŭaĵo por konversaciado. Telefono: DA 9-2230.

“La Nica Literatura Revuo”. Aperas dumonate. Jarabono \$1.25. ... “celas publikigi, sub plaĉa formo, la plej belajn poemojn, originalajn aŭ tradukitajn, la plej artajn prozaĵojn, kaj per tiu alta stilnivele aldiri samtempe la atenton de la laikoj kaj la kontribuadon de la esperantistoj. Sed ĝi volus ankaŭ vekti la intereson de pli larĝa publiko, prezentante jen bildojn pri kuriozaj moroj, maloftaj artaĵoj, homaj kaj naturaj pitoreskaĵoj, jen, tute simple, indan materialon por vivigi la klubvesperojn”...

Ĉefredaktoro: G. *Waringhien*. La nomoj de la Redakta Komitato, kiel *Regulo Perez*, *Reto Rossetti*, *Raymond Schwartz*, garantias la altkvalitecon de la “Revuo”. La revuo estas abonebla pere de EANA. Sendu vian abonkotizon de \$1.25 al la Centra Oficejo tuj, por ke vi havu la “Revuon” de ĝia unua numero (kiu ĵus aperis).

THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "Connor Course" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight "Vinylite" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "Connor Course", as described above, will be sent postpaid for *only \$36*.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only \$6 more* for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order **NOW**:

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.